

# SAT eH

Sennacieca Asocio Tutmonda  
en Hispanio

# INFORMIO

Numero 8/eo  
Decembro 2006

## POR LA FORTIGO DE S.A.T.

Estas sekreto por neniu ke la farto de la laborista movado, kaj aparte la esperanta, ne estas la plej bona de ĝia historio. Speciale el la ekonomia vidpunkto, estas malfacile konkurenci kun la asocioj apogitaj de la ŝtato (eĉ se kelkaj sin nomas *neregistaroj*), aŭ kiuj fidus je la amas-komunikiloj por trovi manieron agi kaj sin organizi. En la lastaj jaroj, estis zorgiga la stato de **Sennacieca Asocio Tutmonda**, kaj ankaŭ de la laboristaj organizaĵoj ligitaj al ĝi. Sed nun tiu stato alvenis al la punkto de malferma ekonomia krizo.

Tial, la lasta Kongreso de SAT faris publikan alvokon al la savado de la asocio kiel tia. Specife, estas malfacile plu konservi la ununuran pagatan oficiston, la ĝeneralan sekretarion. La Kongreso faris specifan komision al la estraro, ke oni esploru ĉiujn eblajn solvojn. Inter alie, oni prikonsideras la eblecon vendi la sidejon. Alia helpo povas veni el nova figuro: la *dumviva asociano*. Ni faras specialan alvokon al ĉiuj simpatiantoj de SAT, por ke ili aliĝu al la asocio. Vi povas fari tion pere de nia peranto, kaj samtempe kasisto de SAT-en-Hispanio. La adreso estas: Pedro Sanz, C/ Mar de Fora 13, esc. izqda. 3-B; 28400 – Collado-Villalba, Madrid. Retpoŝto: [pmariass1@auna.com](mailto:pmariass1@auna.com). La kotizo por la jaro 2007 estas 40 eŭroj (la duono, t.e. 20 € por emerituloj, studantoj aŭ aliaj personoj kun specialaj bezonoj). La pago povas esti rekte farita al la konto de la banko Uno-e (grupo BBVA): 0227-0001-85-0200526929.

Vi ankaŭ povas fariĝi dumviva membro, pere de kotizo egala al 25oble la ĝenerala kotizo, t.e. 1000 eŭroj (500 en specialaj kazoj).

(Samtempe, ne forgesu sendi viajn kotizojn por SAT-en-Hispanio. La kotizo por 2007 estas 6 eŭroj, kaj la pago estas sendebla al la sama konto, antaŭe menciita)

**La laborista esperanta movado pli ol iam bezonas vian kunlaboron. SAT estas nur tio kion la SATanoj deziru.**

## PORPACA AGADO



Laŭ la propono de la beograda Kongreso, SAT aliĝis al la Monda Koalicio kontraŭ la pafaĵojetoj el bomboj (tiuj armiloj konsistantaj el bomboj disĵetantaj bombidojn, kaj ankaŭ konataj kiel *grapolbomboj*). Tiu grupo, pli konata sub la siglo CMC, konsistas el tre diversaj asocioj el la tuta mondo, kiu lanĉis kampanjon por la forigo de tiu speciale kruela formo de milito, kiu, kiel la minoj, vundas aŭ mortigas homojn eĉ post la fino de la militoj, kaj senkonsidere de la aĝo kaj personaj kondiĉoj.

# KONGRESO

## 79a SAT KONGRESO 19-26.08.2006

En la kvindekjariĝo de la unua SAT kongreso en Belgrado, denove renkontiĝis en ĉi-tiu urbo proksimume 150 membroj de SAT kaj simpatiantoj el pli ol dudek landoj. Surloke, la Kongreson organizis la Fervojista Esperanto Societo "Branko Maksimoviĉ" kaj la OKK, kies prezidanto estis Tereza Kapista. La solena malfermo okazis en salonego de la serba Ministerio pri Transporto. Dum la kongreso okazis kvar laborkunsidoj, dum kiuj la SAT-anoj pridiskutis la raporton pri la antaŭa jaro, la nunan financon kaj membrecan situacion, diversajn proponojn rilate la estontan agadon de SAT, la varbadon kaj solvon de la nunaj problemoj de la Organizo.

Dum la kongreso la partoprenantoj ankaŭ debatis pri diversaj problemoj de la nuna politika internacia situacio. Krome, okazis la kutimaj kunsidoj de la diversaj frakcioj (komunista, liberecana, ĉielarka, poresperanta, sennaciista, ktp.) kaj denove ekfunkciis la porpaca frakcio de SAT. Dum la LEA-kunsido, la diversaj Laboristaj Esperantaj Asocioj (SATEH, SAT-Amikaro, SATEB, ARCI-Esperanto) debatis pri la evoluo de iliaj asocioj kaj la agadoj en la koncernitaj lingvaj regionoj, kaj pri la estonta kreado de LEAo en Japanio.

Dum la Kongreso, krom la politika diskutado kaj studado de organizaj aferoj, la partoprenantoj ĝuis tre riĉan kulturen kaj turisman programon. Prelegoj pri diversaj temoj, interalie tre interesa prelego far la kamaradoj Weiss pri kontraŭpersonaj minoj, pafaĵojetoj el bomboj kaj malarmado ĝenerale, kaj ankaŭ la konkreta laboro de SAT pri senminigo en la teritorio de Kroatio. La partoprenantoj ekskursis al la fortikaĵo de Smederevo, al Mokra Gora, Monto Avala, la urbo Belgrado, ĝia fortikaĵo kaj la parko Kalemegdan. Ankaŭ okazis teatraĵoj, serbaj artistoj (interalie blindaj) kantis tradiciajn serbajn kantojn, ktp.

### Deklaracio

La 79-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunveninta en Beogrado de la 19-a ĝis la 26-a de aŭgusto 2006:

- malakceptas ĉian terorismon, ĉu fare de ŝtato ĉu fare de alia organizaĵo, kiu mortigas homojn;
- SAT alvokas ĉiujn, i.a. esperantistojn, prepari kondiĉojn de longdaŭra paco en Mezoriento per historia klerigado kaj disvolvo de interfratiĝaj rilatoj ĉe ĉiuj koncernatoj cele al akcepto de frataj kaj ekvilibraj solvoj;
- postulas la liberigon de la malliberigitaj, kiujn la usona ŝtato kontraŭjure tenas en la koncentrejoj en Guantanamo kaj aliaj lokoj, je la nomo de la « milito kontraŭ terorismo », kaj postulas la liberigon de ĉiuj politikaj malliberuloj en la mondo;
- rediras al la landoj, kiuj ankoraŭ ne subskribis la Konvencion de Otavo, ke URĜAS subskribi tiun Konvencion por elimini la kontraŭpersonajn minojn sur nia planedo;
- subtenas la batalon de C.M.C.: Monda Koalicio kontraŭ la pafaĵojetoj el bomboj, kaj deziras, ke SAT eniru en la Koalicion por partopreni en tiu batalo;
- solidariĝas kun ĉiuj bataloj en la mondo kontraŭ la detruo de la socialaj rajtoj kaj alvokas al sennaciigo de ĉi tiuj bataloj; ĝi salutas la venkon de la francaj studentoj, laboristoj, pensiuloj kaj senlaboruloj kontraŭ la kontrakto por unua dungo en Francio;
- alvokas al energia kontraŭstaro de la naciisma edukado trudita en lernejoj en la tuta mondo, kaj aparte solidaras kun la batalantoj por la konservo de la 9-a artikolo de la japana konstitucio;
- protestas kontraŭ la politiko de la Eŭropa Unio, de Usono, Aŭstralio kaj aliaj landoj, kiu i.a. manifestiĝas per fermo de landlimoj kaj forpelo de neleĝe alvenintaj enmigrintoj; ĝi postulas enmigran politikon kun humanisma sinteno;
- defendas la liberecon de konscienco kaj la rajton ĝin esprimi; pro tio ĝi ankaŭ promocias la disigon de la eklezioj disde la ŝtato.

## Gvidrezolucio

La 79-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunveninta en Beogrado de la 19-a ĝis la 26-a de aŭgusto 2006:

- petas ĉiujn, kiuj tion povas, helpi al SAT per mondonacoj;
- esprimas sian fidon al la PK por, konsiderante la proponojn faritajn dum la kongreso, solvi la financon krizon laŭ la plej bona maniero samtempe por SAT kaj por Kreŝimir Barkoviĉ, inkluzive per vendo de la sidejo kiel eventuala solvo; ĉe kio ĝi postulas, ke li okaze de maldungo ricevu la diferencon inter sia antaŭa salajro kaj la ŝtata senlaborula kompenso, kaj ke li poste ricevu enspezon egalan al la antaŭe atendita pensio;
- alvokas plu diskuti la proponon pri Eldonkooperativo de SAT, kun la celo alkonduki decidon per baldaŭa referendumo;
- proponas, konsiderante la bezonon pri allogo de novaj membroj, i.a. junuloj, malfermi je limigita tempo la interretan SAT-diskutejon al simpatiantoj, kiuj havas rekomendon de SAT-kamarado;
- vokas al pliriĉigo de la esperanta Vikipedio, ĉefe en ĝia socipolitika parto, al verko aŭ traduko de SAT-rilataj artikoloj en nacilingvaj Vikipedioj, kaj al intima kunlaboro per- kaj por-esperanta kun nacilingvaj retejoj, kies celoj kongruas kun tiuj de SAT;
- rekomendas perretan LEA-kunlaboron, spronas al energia varbado por SAT, kaj vokas al kreado de novaj LEA-oj tie, kie ili ne ekzistas;
- salutas la revigliĝon de la Porpaca Frakcio de SAT.

### LA VENONTA SAT-KONGRESO

La Kongreso de SAT en 2007 okazos en Parizo, precize en la inĝeniera lernejo “Ecole Centrale”, en Chatenay-Malabry, suda ĉirkaŭurbo de la franca ĉefurbo, inter la 21-a kaj 28-a de julio.

## HISTORIO

» La revuo “CNT” publikigis en sia marta numero la tekston de prelego pri *Anarkiismo kaj Esperanto*. Ĝi estas la sama teksto kiun nia asocio publikigis kiel *Dokumento-02*, kiu siavice estas traduko de artikolo de Will Firth en germana enciklopedio pri Anarkiismo. En posta numero (326, aŭgusto-septembro), la revuo publikigis alian artikolon, en kiu nia samideano Antonio Marco Botella rakontas pri la specifa rilato de la hispana anarkiista movado kun la internacia lingvo.



Sub la nomo *LIBERTARIOS*, vi povas trovi la originalan tekston en la hispana en la retadreso <http://www.nodo50.org/esperanto/libertarios.htm>.

» Inter la 27-a kaj la 29-a de novembro okazis en Madrido la Internacia Kongreso pri la Hispana Intercivitana Milito. En ĝia kadro Toño del Barrio kaj Ulrich Lins prezentis kontribuojn titolitan “La utilización del esperanto durante la Guerra Civil Española” (*La utiligado de la lingvo esperanto dum la Hispana Intercivitana Milito*).

» Dum la lastaj monatoj ekspozicio pri la “Liberecana memoro” traveturas la ĉefajn urbojn de Hispanio. Ĝi konsistas el 26 paneloj, kiuj pritraktas la sociajn kaj kulturajn trajtojn de tiu ĉi movado en la 30-aj jaroj. Unu el la paneloj estas integre dediĉita al Esperanto, kaj estis pretigita kun la helpo de la veterana amiko Eduardo Vivancos, kiu ankaŭ verkis tekston por la katalogo. Vidu: <http://www.memorialibertaria.org>

## KURSOJ

Bonŝance, plimultiĝas la kursoj de Esperanto, en diversaj urboj. La respondo en Madrido estas pli kaj pli kontentiga. La iniciatoj plimultiĝas en Katalunio kaj Andaluzio.

Tiom, ke ni devis krei specialan paĝon en nia retejo:

<http://www.nodo50.org/esperanto/kursoj.htm>


## ALIAJ INICIATOJ

» SATEH ree okupiĝis pri la Libroservo kiu estis organizita en la kadro de la Hispana Esperanto-Kongreso en El Puig (apud Valencio) en la monato julio. Krome, la anoj de SATEH reprezentis SAT-on en la Movada Foiro okazinta dum la Universala Kongreso de Florenco, kaj gvidis la tie okazintan kunvenon de SAT-anoj, por debati kaj prezenti la asocion al la interesiĝantaj esperantistoj.

» Nia ĉilia kamarado José Antonio Vergara partoprenis, la 20-an de julio en Milano, en la prezentado organizita de nia frata asocio Arciesperanto per prelego pri: “Ĉu esperanto estos lingvo ebla de alia mondo ebla?”. Arciesperanto estas novkreita asocio, sub la ombrelo de la vasta itala progresema asociaro Arci.

» Nia franclingva fratasocio SAT-Amikaro estis unu el la 150 asocioj kiuj partoprenis en la 2a Salono de la Paciniciatoj, okazinta en Parizo de la 2a ĝis la 4a de junio 2006 kaj organizita, sub patronado de Unesko, de la “Franca kunordigado por la internacia jardeko de la disvastigo de kulturo de la neperforto kaj de la paco”.

## KULTURO



Finfine atingis la esperantan publikon “Gerda malaperis – La filmo”. Bazita sur la internacie konata samnoma lernolibro de Claude Piron, ĝi estis produktita de *Imagu Filmo*, sub la kompetenta gvidado de Joe Bazilio Costa kaj Karen Pereira, el la brazila urbo Formiga.

La filmo daŭras unu horon kaj dekdu minutojn, kaj la DVD entenas aliajn aldonajojn. Ĝi inkludas subtitolitajn versiojn en pluraj lingvoj, inter kiuj la hispana. Tio igas ĝin bona ilo por lernado de Esperanto, des pli ke ĝi komenciĝas per tre facila lingvo, kiu iom post iom fariĝas pli kompleta.

En Hispanio peras ĝin nia kamarado Pedro A. Hernández Úbeda. Oni povas ĝin mendi en la adreso [esperantio@ono.com](mailto:esperantio@ono.com).

Pliaj libroj, diskoj kaj filmoj, en:

<http://www.nodo50.org/esperanto/libroservo.htm>

---

**Por kontakti kun ni:**

**SAT-en-Hispanio (SATEH)**

Poŝtokesto (Apartado de correos) 8537, ES-28080-Madrid

[esperantio@nodo50.org](mailto:esperantio@nodo50.org)

<http://www.nodo50.org/esperanto>